

EŬROPO

muziko kaj vortoj: EMANUELE ROVERE (Manŭel)

Enkore mi kultivas belan revon.

Ĝi naskiĝis jam dum mia infanaĝ'.

Mi kreskis kaj mi prenis kiel devon

lukti por ĝin realigi kun kuraĝ'.

Mi revas pri estonta nova mondo

kie regos la justeco, la liber',

ĉiuj homoj en frateca, granda rondo

kunlaboros por la paco, la prosper',

kun respekto por naturo kaj medio

ĝuas kune la riĉaĵojn de la ter'.

Ho mondo, ho mondo, en via estont'

ne plu venu de la militoj la hont'.

Sed estu fiero kaj granda honor'

por ĉiuj popoloj vivadi en paco kaj glor'.

La "HEJMO KOMUNA", la nova, la GRANDA ESPER'.

Ni studu l' historion de Eŭropo

kun la dua mondmilita tragedi'.

Teruras, ke personoj en milopoj

tiel vundis kaj mortigis inter si.

El tio la konvinkon nun ni prenu,

ke milito estas ega abomen',

pri rasismoj, naciismoj ni komprenu,

ke ja temas pri la plej granda malben',

ke landlimoj estas nur sensecaj baroj,

honto por l' inteligento de l' homar'.

Eŭropo, Eŭropo, jen via estont':

Vi estos modelo por la tuta mond',

pri demokratio, civilo, liber',

por multaj popoloj la nova, la granda esper'.